



gazetara komuniko

*Eŭropo
Demokratio
Esperanto*

La 3a de marto 2022

Rusia armeo agrosis Ukrainion, ankaŭ nin

La nuna milito estas milito de la rusia registaro kontraŭ la ukraina registaro, por ŝanĝi tiun registaron.

Eĉ se demokrateco de Ukrainio ne estas perfekta, tamen la ukraina registaro estas elektita de la popolo de la lando, demokrate. Do tiu milito kontraŭ ukraina registaro estas milito kontraŭ demokratio.

Ĉar Ukrainio estas eŭropa lando, ĉar ĝia registaro deziris proksimiĝi al Eŭropa Unio, tiu agreso ankaŭ estas agreso kontraŭ Eŭropa Unio kaj ĝiaj celoj de paca kunvivado, unueco en diverseco.

Malfeliĉe, bataloj kaj mortigoj komenciĝis en 2014, post decido de la ukraina registaro ke la ukraina lingvo estos la sola oficiala lingvo de la lando.

Lingvoj gravas en politiko. Necesas ke homoj de malsamaj lingvoj povu paroli reciproke. Pro tio, Eŭropo-Demokratio-Esperanto aktivadas por uzo de la internacia lingvo Esperanto, facila, preciza, justa.

Ni kondamnas ĉian militon kaj mortigon. Pri tiu milito, la internacia principo de malpermeso de perforto far fremdaj registaroj fondas komdamnon de rusa registaro pro milita agreso.

nome de la Federacio Eŭropo-Demokratio-Esperanto,

Pierre Dieumegard